



Numero 2024:11, marto 7. Pezo: Word 40, PDF 250 KB, sume 290 KB

Dek jaroj de AMO

Jen ankoraŭ plia atingo! La unua AMO-seminario okazis ekde la 14-a de marto en 2014, depost tiam pasis dek jaroj per la kumuliĝo de 108 seminarioj. Temas do pri averaĝo de 10,8 seminarioj jare. AMO-seminarioj penetras pli profunde ol aliaj movadaj kunvenoj. Jen landoj, kiuj gastigis AMO-seminaron, sed neniam Universalan Kongreson de UEA:

Barato, Benino, Burundo, Indonezio, Irano, Kartvelio, Kongo DR, Latvio, Maroko, Nepalo, Nov-Zelando, Rumanio, Rusio, Tanzanio ĝis aŭgusto, Togolando, Turkio kaj Ukrainio.

Jen tabelo kiu malprecize donas indikojn pri la kontinentoj kaj landoj de la seminarioj. Tra la tabelo ni uzas la landkodojn de ISO (la normiga instituto).

Jaro	Afriko	Ameriko	Azio	Eŭropo	Sume
2014	1 (TG)	2 (BR,CA)	1 (CN)	4 (HU, IT,SK,DE)	8
2015	1 (CD)	3 (BR, US, CU)	0	5 (FR, IT, SE, HU)	9
2016	1 (TZ)	2 (BR, US)	2 (NP, ID)	6 (SK 2), IT, DK, ES, PL	12
2017	0	1 (US)	2 (GE, KR, TR)	8 (DE, IT, FR (2), PL, CH, ES, RU.	12
2018	2 (BI, MA)	3 (US 2, CU)	1 (IN)	5 (RU, PL, ES, PT, RU UA,	12
2019	1 (BI)	1 (US)	2 (IR, VN)	4 (PL. RS, RO, UA)	8
Sumo	6	13	8	32	58

Jaro	Afriko	Amer.	Azio	Eŭropo	V	Oc	Sume
2020	0	0	2 (IR, CN)	4 (SK. FR, NO,PL)	3	1	10
2021	2 (BJ, TG)	0	2 (IR, JP)	3 (FR, PL, HR,	3	0	10
2022	2 (SN, TG)	1 (CU)	3 (IL,JP, CN)	7 (FR, IT, HR 2, PL,LT, IT)	1	1	15
2023	2 (BI, TG)	1 (BR)	0	7 (HR (2),CZ, HU, LV, IT)	1		12
2024				1 (HR)			1
Sumo	12	15	15	54	8	2	106

V = virtuala. **Oc**: Oceanio: NZ en 2020 kaj AU en 2022.

Ĝis nun okazis unu seminario (AMO 108) en 2024. Pliaj estas en preparo. La tabelo sumas je 106, do mankas du: eĉ post multaj horoj da esplorado, SMG ne kapablas klarigi la diferencon: eble rilatas al la pandemiaj perturboj kaj virtualajn seminariojn.

Demonstra Ondo – ondo ne de-monstra

Aperis la demonstra versio de la decembra eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 46-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj teksto-komencojn el la riĉenhava kaj ampleksa 144-paĝa 318-a numero de 'La Ondo', dissendita al la abonantoj antaŭ 45 tagoj. Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2024: <https://sezonoj.ru/2024/02/ondo-123/>

La marta ondo

En marto siajn jubileojn festas Gian Carlo Fighiera (95 jaroj), Petras Čeliasuskas (95 jaroj) kaj John Wells (85 jaroj). Ne forgesu gratuli ilin kaj legu en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* la tutan liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por marto 2024, kiun kompilis Aleksander Korĵenkov: <https://sezonoj.ru/2024/03/marto-11/>

Teo kaj Amo atingas Italion

Ĉina Komunikila Grupo raportas pri nia interkultura evento *Teo, Amo kaj la Mondo* en Parmo. La evento, lanĉita de la Esperanto-Asocio de Tianjin, jam okazis en pluraj landoj, inkluzive de Uzbekio kaj Orienta Eŭropo. Sed estis la unua fojo en Italio.

<https://esperanto.cri.cn/2024/02/23/ARTIHdvcx2rvAaf04eqxj0S240223.shtml>

Alessandra Madella

Kursa pluso

Verkinto(j): Nedeljka Ložajić, reprezentanto de LIBE en Serbio.
Temo: Ekzerco je nivelo A2 pri prepozicioj

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23760>

Titolo: Ne konfuziĝu plu pro konfuziloj

Kategorio(j): Leksika

Verkinto(j): Rafał DARASZ

Temo: konfuziloj, ĝene similaj vortoj

Tipo: Ekzerco, Nivelo: B2

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23758>

Gvidanto kaj aldoninto: Raphael Das Gupta

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko: Rapperswil, Svislando.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27622>

Titolo: Kiel mi eksciis pri Esperanto
Kategorio(j): Komprena
Verkinto(j): Katalin Kovats (testo); Liu Minghui (teksto); Marcia Rego (voĉlegado)
Temo: Kompren-ekzerco baze de nova artikolo ĉe uea.facila
Tipo: Ekzerco je nivelo A2, B1

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/instrumaterialoj?iid=23763>

Brazila Muziko

Jen *Me dá um dinheiro aí*, marŝeton inspirita de tiam fama rolo en humura televidprogramo. Esperantigis **Vitor Mendes**.



Siberia renkontiĝo

Tiĥvina Esperanto-klubo informas, ke la tradiciaj Metiejoj (TEM-oj) okazos ekde la 13-a ĝis la 21-a de julio 2024 en Ozero, 5 km for de Tiĥvin. La eventoj estos plejparte tradiciaj: movada, lingva, tradukista, sporta, kanta, fota, diboĉa ... netradiciaj akcepteblas — proponu. Okazos ekskursoj, koncertoj, naĝadoj tagaj-noktaj kaj aliaj umadoj sen fumado. Proponatas kelktaga antaŭ-TEMa ekskurso al Arĥangelsk kaj TEMaj tuttagaj ekskursoj al Velikij Novgorod, Vologda kaj Staraja Ladoga estas planitaj. Funkcios kafejeto, librobutiko, ludejo kaj arbaro kun diversaj beroj. Retejo de TEMoj-2024 jam funkcias, kun reta aliĝilo. La aliĝo ekvalidas post pago de la kotizo. Pagu, ĝirante la sumon al la telefonnumero ligita al Sber de Belov Aleksandr Viktoroviĉ: +7 921 317 43 03. Loĝadon kaj manĝadon vi pripagos surloke. Partatempa partopreno eblas. Demandojn adresu al Mikaelo Bronŝtejn en Telegram, VK, retpoŝte: mamuto@rambler.ru

Aliru la gazetarajn komunikojn de UEA

La gazetara komuniko de UEA, N-ro 1158, videbla en la retejo de UEA, rakontas pri bitlibro senpage elŝutebla pri la kongresa temo de la 108-a UK: Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj. Se vi ankoraŭ ne abonas la gazetarajn komunikojn de UEA, aliru <https://uea.org/via/retlistoj?listo=gk> (ne necesas ensaluti). Por revizii ĉiujn viajn abonojn en UEA vizitu <https://uea.org/via/retlistoj> (necesas ensaluti).

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio** |Vicprezidanto

Facila fluso

<https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/la-ovo-r413/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/kiel-mi-eksciis-pri-esperanto-r415/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/tra-la-reto/drops-r417/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/balaibalano-la-444-jara%C4%9Da-pra-esperanto-r410/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/e%C5%ADrovizio-kaj-esperanto-r416/>

La hungara konsulo en Malto partoprenis en Eo-evento

La malta poeto, romanisto, tradukisto kaj esperantisto Carmel Mallia tradukis *La Tragedio de l' Homo* de Madách el la Esperanta versio de K. Kalocsay en la maltan lingvon. Ĉi tiu traduko estas la unua mallingva traduko de *La Tragedio*. La verkon eldonis Hungaria Esperanto-Asocio. En la ĉeesto de la hungara konsulo en Malto la traduko estis transdonita al la Malta Nacia Biblioteko. Pri la evento aperis multaj artikoloj en malt- kaj anglalingvaj periodaĵoj de Malto. Nun *La Tragedio* elŝuteblas el la bitlibrejo de la Hungara Nacia Biblioteko Szécsényi ĉe <https://mek.oszk.hu/hu/>.

Jozefo Horvath, www.vortaro.hu

Charters en Ĉinio

Video pri la festo por la jubileo de Zaozhuang-Universitato. Duncan Charters, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj iama prezidanto de ILEI, vizitis Zaozhuang-Universitato en decembro 2023, por festi la dekjariĝon de ties Esperanto-Muzeo. La gestudentoj de la Esperanto-fako kantis kaj interagis kun li.

[La vizito de Duncan Charters al Zaozhuang-Universitato](#)

Alessandra Madella

===== vortoj: 1005 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@uea.org>